

LA FLEKSIA SISTEMO

DE ESPERANTO

(R. P. NOGUERIA)

Neniu povas dubi, ke la morfologia strukturo de Esperanto estas relative tre regula. La multaj kazoj de alomorfismo, de heterogenaj fleksiaj paradigmoj aŭ neregulaj derivaĵoj, kiuj ofte komplikas la morfologion de la naciaj lingvoj, tute ne havas similaĵojn en Esperanto. Sed la ekzisto de tiu rimarkinda reguleco, mem frukto de la planeca naturo de la lingvo, ne implicas, ke la Esperanta morfologio estas facile analizebla. Fakte, troviĝas tiel granda nombro da diversspecaj gramatikaj kaj preskaŭgramatikaj morfemoj kaj tiel libere ili estas kombinitaj kun la radikaloj, ke la rezultantaj sistemoj de derivado kaj fleksiado formas mekanismojn vere kompleksajn kaj prezentas malfacilan taskon al la morfologia analizisto.

Parte pro la menciita komplekseco, parte pro la malsimileco de lingvistika orientado, nature okazas, ke la lingvistoj esplorantaj tiun temon diverĝas pri diversaj gravaj punktoj. Ĉi tiu konstato povas servi kiel pravigo al ĉi tiu laboraĵo, kiu celas eksponi temon jam traktatan de Van Themaat en interesa artikolo aperinta en ĉi tiu revuo (1). Ĉi tie ni uzos perspektivon iom diferenca, kelkrilate diverĝante de tiu aŭtoro. Necesas diri, ke la meritojn de tiu artikolo ni trovas tute ne diskuteblaj, interalie pro tio, ke tie, laŭ nia scio por la unua fojo, oni provis apliki al Esperanto korektan lingvistikan nocion pri fleksio. Malgraŭ tio, ŝajnas al ni, ke Van Themaat ne ĉiam estis sufiĉe klara kaj, krome, ke lia opinio pri kelkaj apartaj faktoj de la gramatika fleksio en Esperanto devas esti kritike ekzamenata.

Per ĉi tiu artikolo ni esperas kontribui al la debato pri la ecoj kaj faktoj de la Esperanta gramatiko, kiu nur nuntempe komencas esti farata en vere scienca maniero.

LA KONCEPTO PRI FLEKSIO

Unu sama vorto povas prezentiĝi sub diversaj gramatikaj formoj. El la vorto *domo*, ekzemple, oni renkontas la jenajn fleksiajn formojn: *domo, domoj, domon, domojn*; kaj el *paroli*: *paroli, parolas, parolus, parolu, parolanta*, ktp. (8). La termino fleksio signifas "flekŝiĝo" - iu vorto devas kvazaŭ flekŝiĝi por montri la gramatikajn kategoriojn de nombro, kazo, modo, k.c. La morfemoj, kiuj reprezentas tiajn nociojn estas nomataj fleksiaj morfemoj aŭ dezinencoj (2). Tiel oni parolas pri dezinenco de pluralo (-j), de akuzativo (-n), de indikativo (-s), ktp. Iu dezinenco povas esti signata per la manko de alia; la singularo, ekzemple, estas montrata per la foresto de la dezinenco -j. Temas pri morfemo nulo, kiun la lingvistoj ordinare simbolicigas jene: \emptyset .

La dezinencoj ne devas esti konfuzitaj kun la klasmarkoj -o, -a, kaj -e, kiuj distingigas la funkciojn de substantivo, adjektivo kaj adverbo, respektive.

La fleksio estas kategorio morfosintaksa. Ĝi povas ekzisti nur tie, kie troviĝas iu morfologia marko al kiu respondas difinitaj konsekvencoj sur la nivelo de la sintaksaj rilatoj. Tio estas la fundamenta principo por rekonado de fleksiaj elementoj. Ekzemple, ĉe la vortformo "domoj" la morfemo -j estas fleksia elemento, ĉar ĝi estas morfologia marko, kiu sintakse devigas la aleston de simila marko en ĉiuj adjektivoj, kiuj eventuale determinos tiun substantivon ("belaj domoj"). La

morfemo -ar de domaro, male, ne konsistigas fleksian elementon, ĉar ĝi ne havas konsekvencojn sur la sintaksaj rilatoj. Aliflanke, spite la kontraŭan opinion de Van Themaat, vortoj kiel koncerne, rilate, k.s., kiuj postulas akuzativon kaj tiel iom similas al verboj el sintaksa vidpunkto, ne povas eniri la paradigmon de la verbaj formoj, ĉar al ili tute mankas morfologia marko de fleksio.

Necesas nete distingi la derivadon disde la fleksio. Ili diferencias almenaŭ pri tri gravaj punktoj:

1. la derivado karakterize liveras novajn vortojn: el *domo* oni faras *domato*; el *super* oni faras *supera*. La fleksio, male, nur aperigas diversajn aspektojn de unu vorto - *domo* kaj *domoj* estas du formoj de unu sola vorto.

2. la derivado estas *libervola* kaj *nelimigita*, ĉar en ĉiu ajn situacio oni disponas pri granda nombro da libere elekteblaj sufiksoj por formi derivaĵon. Kontraste, la fleksio estas *deviga* kaj *limigita*, ĉar la nombro de elekteblaj dezinencoj estas relative malgranda kaj ilia uzado, ĉe fleksieblaj vortoj, estas nepre necesa (3).

3. la fleksio prezentas karakterizajn influojn al la sintaksaj rilatoj, kio ne okazas koncerne la derivadon.

La fleksiaj formoj de unu vorto organiziĝas laŭ paradigmoj. La formo *hejmo* estas paradigme asociita al la formo *hejmon* pro opozicio de kazo. La du formoj estas nedisigeble kunligitaj en la menso de la lingvanoj; tio estas, la funkcio de *hejmo*, nominativa, estas komprenata nur pro tio, ke ĝi kontrastas kun la formo *hejmon*, akuzativa. "En lingvo ĉio estas opozicio", diris Saussure (4).

NOMA FLEKSIO

Propraj al la noma kategorio estas la fleksioj de nombro kaj kazo. Ilia mekanismo estas tre simpla; ambaŭ estas markataj pere de "privativa opozicio", en kiu unu elemento de la opozicia paro estas morfemo nulda: \emptyset x -j por la nombro kaj \emptyset x -n por la kazo.

Tiel la formoj "domo" kaj "knabon" estas korekte analizataj en la sama maniero: dom-o- \emptyset - \emptyset kaj knab-o- \emptyset -n.

La nombro estas la malpli ĝenerala tipo de noma fleksio; ĝi atingas nur la substantivojn, la adjektivojn kaj la adjektivajn pronomojn, dum la kazo aplikiĝas al aliaj vortspecoj de la noma kategorio krom tiuj.

Ankaŭ la lokaj adverboj estas kaze fleksiaj (ĉi-rilate ni devas rimarkigi ke la adverboj tute nature povas esti klasifikitaj inter la

nomoj (5)). Same ili obeas la opozicion \emptyset x -n ("hejme x hejmen").

Kontraŭ la opinio de Van Themaat, laŭ kiu la akuzativo ĉe la lokaj adverboj ne reprezentas veran kazon de fleksio, ni povas starigi la jenajn argumentojn:

1. La rolo de la akuzativo kiel indikilo de celmovo estas esence la sama ĉe adverboj kaj ne-adverboj. Oni komparu, ekzemple, "falas sur la teron" kun "fali teren": tute ne estas diferenco pri funkcio en ambaŭ frazoj. Tio sufiĉas por pruvi la identecon de tiuj fleksiaj mekanismoj almenaŭ el la vidpunkto de la funkcia lingvistiko (6).
2. La opozicio \emptyset x -n estas sisteme aplikata al ĉiuj lokaj adverboj kaj tia sistemeco estas karakterizo de la fleksiaj procezoj (3).
3. Estas vero ke la akuzativigitaj adverboj povas suferi procedon de derivado rekta ("antaŭenigi"), sed tio sama estas konstatebla ĉe la participoj ("estonteco") kaj alispecaj derivaĵoj (la Zamenhofa "vivuo"). Konsekvence, la principo de fermado, defendita de Van Themaat kiel propreco de la fleksio, ne estas adoptinda en Esperanto.
4. La akuzativigitaj adverboj ne prezentas influojn al la sintaksaj rilatoj, sed tio estas klarigebla per la fakto, ke ili ne povas esti determinataj de alispecaj vortoj.
5. Rigardi la markon -n ĉe tiaj adverboj kiel leksikonan morfemon originigas grandan rompon en la ĉie konstatebla reguleco de la Esperanta morfologia strukturo. Oni ne devas forgesi la postulaton laŭ kiu la plej bona lingvistika priskribo estas la plej simpla kaj homogena.

VERBA FLEKSIO

Plej ĝenerale la gramatika sistemo de Esperanto opoziciigas, ĉe la verboj, unu formon infinitivan al diversaj formoj finitivaj, nome, la indikativo, la kondicionalo, la volitivo kaj la participo.

La infinitivo karakteriziĝas de tio, ke en ĝi ne estas implica iu ajn nocio pri modo aŭ tempo; tial ĝi reprezentas la verban procezon en maniero plej universaleca kaj abstrakta. Ĝia dezinento estas la morfemo -i, senpere aldonita al la radikalo.

La finitivaj formoj, aliflanke, devas esti studataj laŭ la fleksioj de modo, tempo kaj voĉo.

Modo povas esti difinita kiel la propreco de la verbaj formoj, kiu montras la psikologian sintenon de la lingvano antaŭ la fakto verbe esprimita (7). Tradicie estas distingataj tri modoj en Esperanto:

indikativo, kondicionalo kaj volitivo, kies tipaj dezinencoj estas -s, -as, kaj -u, respektive.

Ekzistas tamen fortaj motivoj por klasigi la kondicionalon en la indikativon. Unue, pro la reguleco de la distribuado de la morfemo -s en la formoj indikativaj kaj kondicionala. Due, pro la sintaksa funkcio, pli-malpli ekvalenta; ekzemple, kun la participo la kondicionalo funkcias tute same kiel la indikativo, formante la kompleksajn konjugaciojn. Tria, pro la literatura uzo de participaj formoj kiel *mortunta* k.s., kie la morfemo -u aperas izoligita, uzata sammaniere kiel la tempo-indikativaj dezinencoj.

Meillet trafe rimarkigis, ke la tendenco de ĉiuj lingvoj estas spori nur du modojn: la kondicionalon al la volitivo (aŭ subjektivo). En la plimulto de la okcidentaj lingvoj la kondicionalo ne havas propran staton el morfologia vidpunkto, sed ĝi estas formata per la indikativo plus aparta helpverbo, ĝi rezultas el diakrona aglutino de la infinitivo kun speciala indikativa verboformo.

La fleksio de tempo estas trovebla ĉe la indikativo kaj participoj, en kiuj ĝi prezentiĝas sub identa morfologia procezo: la alternado de la dezinencoj -a (prezenco), -i (preterito) kaj -o (futuro). Se oni konsentas pri la klasigado de la kondicionalo en la indikativon, tiam kvazaŭ morfemo devas esti aldonata, la dezinenco -u, kiu signus ian kondicionalan tempon, probable prezencan (8).

La sistemo de fleksiado de la participoj estas iom kompleksa; krom prezenti fleksion de tempo, esence tiun saman de la indikativo, ili havas ankoraŭ fleksion de voĉo kaj noman fleksion.

La ĝenerala dezinenco de la participoj estas la morfemo -t, komuna al la adjektivaj kaj adverbaj formoj. La participoj ne konsistigas modon apartan; tamen en Esperanto ekzistas sufiĉaj motivoj por ilin konsideri subordigitaj al la indikativo.

La participoj estas la solaj verboformoj en kiuj troviĝas fleksio de voĉo. Ĝi konsistas el la opozicio inter aktiva kaj pasiva voĉoj, signata per la paro -n x ∅ ("parolanta x parolata").

La adjektiva participo cetere havas fleksion de nombro kaj voĉo, ĉar ĝi estas iaspeca transira formo inter la verbo kaj la nomo. Tiel oni devas atenti, ke *parolanta* enhavas ne malpli ol sep morfemojn: pa-rol-a-n-t-a-∅-∅.

Fine, ni volas memori, ke nur la adjektivaj kaj adverbaj participoj estas gramatike verbaj. La substantivigitaj participoj ("lernanto") kondukas kiel ordinara substantivoj.

REFERENCIOJ

- (1) Van Themaat, W.A.V. - Fleksio, Derivado kaj Paradigma Morfologio, Sciencia Revuo, 23: 121-33, 1972;
- (2) Marouzeau, J. - Lexique de la Terminologie Linguistique, Paris 1951;
- (3) Mattoso Câmara, J. - Problemas de Linguística Descritiva, Petrópolis, 1969, 47-52;
- (4) Saussure, F. - Cours de Linguistique Générale, Paris, 1971, 168;
- (5) Mattoso Câmara, J. - Estrutura da Língua Portuguesa, Petrópolis, 1970, 69;
- (6) Martinet, A. - A Functional View of Language, Oxford, 1962;
- (7) Meillet, A. - Linguistique Historique et Linguistique Générale, Paris, 1949, 190;
- (8) Kalocsay & Waringhien - Plena Gramatiko, Milano, 1958, Vol. I, 151.